

Solutions for chapter 8

8.1: **1** What time is it? **2** Is it 7 (o'clock)? **3** Not yet; it's only six forty five. **4** What will you do today? **5** This morning I'll go into the city. **6** First I will go to the post office and buy stamps. **7** Next (later) I'll go to the station for information about trains to London. **8** Didn't you go there yesterday afternoon? **9** Yes, but I forgot about the stamps. **10** Yesterday morning I met an old friend. **11** I first met him three years ago in France. **12** In thirty minutes it will be 10 o'clock. **13** So it is now nine thirty.

8.2: **1** Mi iras (*or iros if you haven't yet started*) al la stacidomo hodiaŭ matene. **2** Kiam vi revenos? **3** Mi ne revenos ĝis la dek-dua (horo). **4** Mi renkontis gesinjorojn Lang hieraŭ vespere. **5** Hieraŭ estis la dudek-unua de Januaro. **6** Kio estos la dato morgaŭ? **7** Mi estis (*or jam estas*) tie trifoje. **8** Mi estis tie antaŭ kvar jaroj. **9** Mi estos tie denove post tri monatoj. **10** Kie estas la kunvenejo de la Esperanto-grupo? **11** Ĝi estas apud la urbodomo. **12** La grupo kunvenas lundon vespere (*or lunde vespere if you mean every Monday*) je la sepa kaj duono. **13** Kiom longe daŭras la kunvenoj? **14** Kutime ili daŭras du horojn.

8.3: **1** Estas la tria horo. **2** Estas la kvara horo kaj dek minutoj. **3** Estas la sesa kvindek. **4** Estas la unua kaj duono. **5** Estas la kvara kaj tri kvaronoj. **6** Estas la dek-unua kaj kvin. **7** Estas la dek-dua horo. **8** Estas la oka kaj dudek. **9** Estas la oka tridek kvin. **10** Estas la deka horo kaj kvindek kvin minutoj.

8.4: **1** What time is it? **2** It's half past seven. **3** In an hour and a half it will be nine o'clock. **4** Two hours ago he was in school. **5** In two months I'll be in Sweden. **6** Do you like tea? **7** Yes, I like it very much. **8** How much coffee do you want? **9** One kilogram, please. **10** Yesterday was the first of May. **11** When shall I visit you? **12** Come on Monday or Tuesday; I'll be free at seven. **13** Yesterday I received news from my friend in France. **14** Do you prefer pork or veal? **15** Did you hear the news this morning? **16** At what time will we see the film? **17** We'll see it at nine thirty, after the news. **18** I like the program "Studlokoj" ("Study Places"). **19** Usually it is about universities and colleges, but today it will be about a castle (*or château*) in France.

8.5: **1** Je kioma horo vi aŭdas la veterprognozon? **2** Kiam vi aŭdis la novaĵojn? **3** Ĉu vi venos lundon aŭ vendredon? **4** Ni aŭdis orkestron je la tria horo. **5** Ni venos je la kvara kaj duono aŭ kvarono antaŭ la kvina. **6** Kio estas duono de ses? **7** Kio estas kvarono de dek-duo? **8** Antaŭ tri tagoj mi vidis teatraĵon. **9** Post sep semajnoj mi ricevos permeson. **10** Kiom da horloĝoj vi havas? **11** Ni aŭdis horon da muziko.

Demandoj

1. La familio veturos de Newtown ĝis Grezijono per aŭto kaj ŝipo (*or aŭte kaj ŝipe*).
2. Ili ekveturos sabaton frumatene.
3. Ili suriros la ŝipon en Dovro.
4. Ili manĝos surŝipe (*sur la ŝipo*).
5. Ili eble tranoktos en Neufchâtel.
6. De Bulonjo ĝis Neufchâtel estas inter cent kaj cent dek mejloj.
7. De Neufchâtel ĝis Grezijono estas ĉirkaŭ cent naŭdek mejloj.
8. En Le Mans okazas dudek-kvar-hora vetkurado ĉiun jaron.
9. Jes, Rikardo opinias, ke ili veturos ĉirkaŭ kvin mejlojn laŭ la vetkurejo.
10. Kiam ili alvenos en Grezijono la familio unue trovos la dormoĉambron, kaj poste ĉirkaŭrigardos la lokon.